# La tura horloĝo – komprenekzerco



En iu montara urbo* juna horloĝisto amis belan judinon.
Estis la milita tempo, en la jaro 1945-a.
Sur la urbodoma turo estis kaj estas ankaŭ nun granda horloĝo. La horloĝo sonoregis je ĉiu horo, horduono kaj horkvarono.

Ĝia sono estis tiom laŭta, ke oni aŭdis ĝin ne nur en la urbo, sed ankaŭ en la apudaj vilaĝoj. Ĝia aparataro ene de la turo bruegis.
En la urbodomo oficis la stabo de la interna polico de la okupantoj. La horloĝisto devis en ĉiu tago movi la horloĝon kaj protekti ĝin.
La okupantoj komencis forveturigi judojn al ekstermejo.Ĉiu domo estis traserĉata. Ĉiu kaŝita judo kaj la familio, kiu tiun kaŝis estis pafataj. La horloĝisto deziris savi sian amatinon. Li kaŝis ŝin en la ejeto sub la horloĝo. (Vidu la plej altan parton de la turo sur la foto.) Kiel li sukcesis loki ŝin tie, ke neniu sciis pri tio, estas sekreto. La urbodomo estis tage kaj nokte gardata. Oni supozas, ke li koruptis gardiston.
La horloĝisto en ĉiu tago portis manĝaĵon al la judino kaj forportis malpuraĵojn.
La junulino vivis tie kelkajn semajnojn ĝis la fino de la milito. Ŝi preskaŭ freneziĝis pro la horloĝo. Post la milito la gejunuloj forveturis al alia urbo**.
La viro plu laboris kiel horloĝisto, sed en ilia hejmo estis neniu horloĝo, eĉ ne brakhorloĝo. La virino ne toleris eĉ la plej mallaŭtan "tiktakon".

## La taskoj:

1. Trovu en la teksto afiksojn (prefiksojn kaj sufiksojn) kaj skribu unu novan vorton kun ĉiu el ili.

2. Rakontu la historion per propraj vortoj.

Notoj: * Nowy Sącz - Pollando ; ** Krosno.